

2006

Komenciĝis nova jaro . Ĝi estu al vi agrabla kaj fruktodona kaj rezervu por vi bonan sanon . « Al la mond' eterne militanta », ĝi alportu pacon kaj harmonion !

En la lasta SFS vi legis detalojn pri la **Grin-raporto** . Parenteze F. Grin prelegos dum la Universala Kongreso de Florenco, plia motivo por ni, Esperantistoj, viziti tiun elstaran kaj proksiman eventon . Nome de la tri federacioj de la sudokcidenta parto de Francio, la najbara federacio « Midi-Pyrénées » informis niajn Eŭro-deputitojn pri la raporto . Tuj respondis Sro Onesta (Verduloj), aŭ pli precize lia sekretariino, ke la defendo de la minoritataj lingvoj estas prioritato en lia programo . Ĉu E^o estas konsiderata de li lingvo de minoritato (ĝi ja estas tia) ? En lia programo por la eŭropa baloto li citis esperanton . Ĉu la konkurado de esperanto-listo malplaĉis al li kaj nun li estas malpli subtenanta ? Nome de la federacio mi skribis al « mia » departementa deputito pri la temo . Li promesis rilati kun la ministro pri edukado, laŭ mia peto* . Gravas scii, kion konkludas la ministro pri la raporto Grin . Ni atendu ! Se vi mem volas kontakti vian deputiton, bonvolu rilati kun la federacio por konsistigi dosiereton .

En tiu-ĉi numero vi trovos informojn pri eventoj de la venontaj monatoj . Ĉiumonate okazas io vizitinda . Nepre partoprenu, ne restu izolita en via angulo ! Nur kune ni progresos . Sur la apuda paĝo vi trovos detalojn por aliĝi al la internacia asocio UEA aŭ al la nacia asocio « Esperanto France » . Se vi posedas komputilon kun rapida aliro ADSL, vi povas nun spekti **programojn en esperanto** (internacia.tv) . La afero ekfunkciis en Brazilo en novembro, sekve de la klopodoj de Flavio Rebelo, kiun ni povis renkonti pli frue en Montpellier, okaze de lia varbturneo . Mankas ankoraŭ mono por plej bone funkciigi la aferon . Mondonacojn oni povas sendi al UFE, kiu transsendos . Hejme estas ankaŭ agrable legi gazetojn kaj revuojn en esperanto . Tiel oni progresas en la kono de la lingvo . Liston de aboneblaj revuoj estas trovebla dekstre (ni pardonpetas, ke ni ricevis ĝin iom malfrue) .

Ne forgesu pagi vian reabonon al SFS (7 E por 4 numeroj) . Ni ne povas sendi SFS senpage ! Por ricevi la venontajn numerojn, tuj plenigu la kuponon sube (se vi estas membro de grupo, pagu al via kassist(in)o kaj li/ŝi sendu la sumon de la kolektitaj abonoj antaŭ la venonta numero en aprilo) .

Bonan legadon ! Ne forgesu sendi viajn rimarkojn aŭ kontribuojn antaŭ la limdato . Ekde nun la **limdato estos ĉiam la lasta tago de la trimestro** . Facile memorebla dato ; ne plu estos ekskuzo por la forgesemuloj . Esperanto estas ĉies afero, ankaŭ SFS !

La redaktoro, Jean Hénin

Al kiu sin turni

Kontribuojn por SFS (raportojn, fotojn, rimarkojn, sugestojn, ktp) oni sendu al la redaktoro (ankaŭ prezidanto de la federacio) . Lia adreso estas sur la lasta paĝo .

Demandojn pri la federaciaj aferoj oni direktu al la sekretario : Charles GERARD-VOINÇON

6, Rue du Midi 66000 Perpignan Tel : 04 68 55 51 77

Ĉekon por reaboni al SFS oni sendu kune kun la kupono malsupre al la kassistino Lucette NEGRON
40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel Tel : 04 67 71 05 79 (Ĉeko je la nomo de : Fédération d'espé-
-ranto du Languedoc-Roussillon, poŝtekkonto 956 28 P Montpellier) .

En kazo de adres-ŝanĝo (por daŭra ricevo de la bulteno), tuj informu André CAPUS, 15 Rue des Frères Platter 34000 Montpellier Tel 04 67 63 15 21 . *Anticipan dankon pro via helpo !*

ABONO aŭ REABONO al « Sudfrancia Stelo » por la jaro 2006

Familia nomo Persona nomo

Adreso (skribu klare !).....

Poŝtkodo Urbo/ vilaĝo Telefono (nur en kazo de problemoj)..... (re) abonas la federacian bultenon „Sudfrancia Stelo“ por la jaro 2006 kaj kunsendas per ĉeko la sumon de € (minimуме 7 €), ĉeko je la nomo de Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon

Subskribo,

KOTIZOJ kaj ABONOJ

Cotisations et abonnements

Cotisation internationale à UEA (association mondiale d'espéranto) :

56 € (guide + Jarlibro + monata revuo « Esperanto ») 22 € (guide + Jarlibro) 9 € (guide)

Les moins de 30 ans sont aussi membres de TEJO et reçoivent en plus "Kontakto" et "Tejo-tutmonde"

Cotisation nationale à Esperanto-France (filiale de UEA), la fédération est membre d'E°-France

Adhésion : 33 € Abonnement au « Monde de l'E° » : 22 € (tarif pour non adhérents : 30 €)

Adhésion E°-jeunes : 30 €, 15 € pour étudiants et chômeurs, 10 € la première année, avec bulletin Jeunespéranto-infos . Les cotisations ci-dessus sont à adresser à E°-France (voir ci-dessous)

Sat-Amikaro (Anationalistes) : 134, boulevard Vincent Auriol 75013 Paris

Cotisation 13 € Cotisation de soutien 47 € Jeune ou chômeur : 17 €

Abonnement à « La Sago » 21 € pour les adhérents, sinon 31 €

ABONNEMENTS

Nom de la revue	Nombre par an	Tarif
• Esperanto (revue de UEA)	11 n°	35€
• Fonto (revue littéraire)	12 n°	30€
• Heroldo de Esperanto	17 n°	32€
• Juna Amiko (revue interscolaire)	3 n°	14€
• Komencanto (international, de Russie)	4 n°	15€
• Kontakto (revue éditée par TEJO)	6 n°	21€
• La Kancerkliniko (politique, culture, etc.)	5 n°	22€
• La Ondo de Esperanto et son supplément littéraire (Russie)	11 n°	
- voie terrestre		27€
- voie aérienne		32€
• Le Monde de l'Espéranto (bilingue)	6 n°	30€
• Le Travailleur espérantiste	6 n°	20€
• Literatura Foiro	6 n°	30€
• Litova Stelo : voie terrestre	6 n°	14€
- voie aérienne		20€
• Monato (magazine international) voie terrestre	11 n°	46€
- voie aérienne		50€
- La Jaro (agenda édité par Monato) l'exemplaire	1 n°	5€
• Rok'Gazet' (musique) 1 numéro/an	pour 3 n°	16€
• Verda Lupeo/Fenikso (philatélie)	3 n°	17€
		Total :

Et n'oublions pas que dans notre région est éditée « Esperanto-Info », revue d'information en français sur l'espéranto, rédacteur Francis Bernard, Les Bories de Coperlac – Mas St Chély 48210 Ste Enimie Abonnement : 20 € (soutien 30 €)

Esperanto
 France
 Esperanto-France, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS
 Tél : 08 717 718 33 (tarif local) • Fax : 01 42 78 08 47 • info@esperanto-france.org

TRA LA FEDERACIO

BEZIERS

VENONTAJ KUNVENOJ

En MVA je 14h30 la **14an de januaro** (ĝenerala kunveno, poste ni gustumos la trireĝan kukon), la **11an de februaro**, la **11an de marto** kaj la **8an de aprilo** (preparoj de la staĝo kaj de la vizito de eksterlandano).

ZAMENHOF-TAGO

Ni festis ĝin la 10an de decembro kun 28 geamikoj . Krom la anoj de Béziers venis Montpellieranoj kaj ankaŭ esperantistoj de Lozère, PO, Var, Belgio . Amika etoso . Post varmaj trinkaĵoj matene, ni interkonatiĝis kaj kantis . Geneviève subtenis nin per bekfluto . Poste rakontetoj kaj fine ni trinkis aperitivan kun kukoj antaŭ ol komune manĝi en restoracio .

Posttagmeze ni ĝuis la raporton de la UK en Vilno : lumbildoj pri la vojaĝo kaj vidaĵoj de la landoj, kaj filmo pri la kongreso mem okupis grandan parton de la posttagmezo . Gratulojn kaj dankojn al la aŭtoroj, raportistoj . Ĉiuj spektintoj estis tre kontentaj . Dankon al ĉiuj, kiuj sindoneme laboris por gajigi tiun tagon . Ĝis venonta kunveno !

RILATOJ KUN EKSTERLANDO

Ni kandidatis por la akcepto de Kubano . Se ni estos elektitaj, ni havos la plezuron de tiu vizito en aprilo . Sed ĝis nun ni ne povas precizigi la daton .

STAĜO

Ĝi okazos en **Batipaume de la 7a ĝis la 14a de junio** . Ni loĝos en pli komfortaj ĉambroj ol lastjare (teretaĝaj) . La aliĝiloj jam pretas . Diversnivelaĵoj kursoj . Dimanĉe la staĝanoj povos laŭdezire partopreni en la Federacia kongreso, aŭ...ripozi . Ni esperas, ke multaj el vi ĝuos tiun printempan semajnon .

Bildoj : Z-tago : la bekflutistino kaj kantantaj amikinoj / Partoprenantoj provas kunkanti



MONTPELLIER

Z-TAGO

Partoprenis dekkvin personoj . Unue estis informoj pri esperanto en Ariège kaj aliaj lokoj . Poste Josée kaj Jorgo ludis tri mallongajn skeĉojn . Inter la skeĉoj Annick kantigis la ĉeestantojn . Ĉiuj estis kontentaj kaj petis, ke oni antaŭvidu kunkantadon okaze de la venontaj monataj kunvenoj . Gaja etoso dum la komuna tagmanĝo .

NDLR : la redaktoro ne povas inventi raportojn pri la okazintaĵoj, se neniu sendas informojn . Ĉifoje la rikolto estas iom magra . Espereble estos pli bone venontfoje . Izolitoj, kiuj agadas por esperanto, estas ankaŭ invitataj sendi informojn pri siaj klopodoj kaj spertoj .

Ĉar ofte oni forgesas la limdaton (indikatan sur la lasta paĝo), ni plisimpligu la aferon . La limdato estos la lasta tago de ĉiu trimestro .

***Prelegturneoj de France-Esperanto :** Du prelegantinoj estas atendataj en marto kaj aprilo : Lena Karpunina (el Taĝikio sed nun vivanta en Berlino), kiu verkis novelaron kaj bele kantas en esperanto kaj Maritza Gutierrez, estraranino de UEA kaj parolistino ĉe Radio Havana, kiu parolos pri la E-movado en Kubo aŭ Radio Havana kaj Kubo ĝenerale . Por tiuj du prelegturneoj Francio estis dividita en du egalaj partoj, nia regiono estas en la dua, kiu akceptos Maritza (ĉu Béziers, ĉu Montpellier, ĉu ambaŭ) . Ni baldaŭ scios pri la decido kaj la datoj .*



NOVAĴOJ el ESPERANTIO KATALUNIO

« Kataluna Esperantisto » estas konsultebla je
<http://www.esperanto-ct.org/c/ke.htm>
Jen kelkaj rendezuoj por la jaro 2006 :

Del 3 al 5 de marĉ
Atlantika Plongado
Areia Branca (Portugal)
esperanto.web.pt/plongxu

Del 29 d'abril a l'1 de maig
**Printempa renkontiĝo/
Jornades d'esperanto**
Canet de Mar (Maresme)
www.esperanto-ct.org/kej

Del 30 de setembre
a l'1 d'octubre
Nord-kataluna renkontiĝo
Vallmanya (Conflent)
www.esperanto-ct.org

Del 8 al 10 de desembre
Congrés Català d'Esperanto
Amposta (Montsià)
www.esperanto-ct.org

TULUZO

La loka esperantistaro akceptis S-inon Jiang el Shanghai (Ĉinio). Bone disvolviĝis la Z-tago.
« Vinilkosmo » proponas novajn kompakt-diskojn (vidu p.10).

AVIGNON

La Z-tago estis kiel kutime ventega. Tio ne malpermesis al proksimume 45 personoj sin varmigi en la salono, kie S-ino Humm prelegis pri la vivo de Louise Michel. Dum la komuna manĝo en grandega manĝoĉambro, la babiladoj bonege plenumis la aeron kaj varmigis la etoson. Vespere, la spektantaro kantis kaj poste varme aplaudis la diversajn skeĉojn de la avinjona grupo kaj ankaŭ de la montpeliera grupeto. Ĉijare 10 Montpellieranoj partoprenis la avinjonan Z-tagon.

PRELEGTURNEOJ

Preskaŭ samtempe (en marto-aprilo) vizitos Francion du prelegontinoj. La unua estos Lena Karpunina el Taĝikio, kiu skribis interesan novelaron kaj ankaŭ bele kantas en E°. La dua estos Maritza Gutierrez, estraranino de UEA pri « landa agado », parolistino ĉe Radio Havana (Kubo). Pro la multaj grupoj, kiuj

kandidatis, du en nia regiono –Béziers kaj Montpellier- Francio estis dividita en du partoj, kaj ni akceptos Maritza (Kiam kaj kie? Baldaŭ venos definitiva respondo, verŝajne ĉirkaŭ la 18a de aprilo). Petu detalojn de la grupoj.

KVINPETALO

organizas staĝojn kaj ekzamenojn tutjare. Jen kelkaj baldaŭaj eventoj :
14-18 Feb : preparado al atesto pri supera lernado (traduko, disertacio + historio “en la tempo de Waringhien”) kun J. Dumoulin kaj T. Pinet
18-20 Feb : debatoj pri pedagogio kun S. Sire
21-25 Feb : inicado kaj unua praktiko de E° kun Josée Lafosse kaj praktikado de la lingvo (dua grado) kun Serge Sire.
18-22 Apr : praktikado de la lingvo (2a grado) kaj inicado al traduko kun Godeleine Logez
23a Aprilo : Ĝenerala Kunveno de SYM
25-29 Apr : Preparado al la Kapableco pri pedagogio kun Renée Triolle.
adreso : Rue du lavoir 86410 Bouresse
informoj@kvinpetalo.org

HONORIGO

Ĉu vi jam konas tiun homon ?
Li jam vizitis nin (prelegturneo), prezentis sian landon dum la kongreso de Boulogne sur Mer kaj estis la aktiva prezidanto de la UK de Vilno (Litovio). Povilas Jegorovas estis elektita la Esperantisto de 2005.
Gratulojn pro la meritita distingo !



PASPORTA SERVO

la adreslisto de gastigantoj, indikis en 2005 1364 adresojn en 89 landoj. En 2006 ĝi ampleksas 1320 adresojn (iom malpli) en 92 landoj (do en tri pliaj landoj). *Fariĝu gastiganto!*

NOVA BILDSTRIO

Post la sukcesa bildstrio « Gastono, la fuŝulo », JEFO realigis novan bildstrion « La eta Spirou » kun la subtitolo « Salutu la sinjorinon ! ».
Ĝi estas mendebla al UFE aŭ, se vi povas pacienci ĝis la federacia kongreso en junio, vi povos akiri ĝin tiam.

VINTRAJ OLIMPIKOJ en TORINO

de la 10a ĝis la 26a de februaro 2006.
Informoj pri la ludoj <http://www.torino2006.org/>
pri restado ĉe la sidejo de Torina E°-centro:
zorion99@libero.it



Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon
CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO
Stage du 7 au 14 juin 2006

Stage de printemps à Batipaume - AGDE

Programme de la semaine

Matin : cours 4 niveaux de 9h à 12 h

Après-midi : après le repas de midi : repos, chacun dispose de son après-midi comme il l'entend – sieste, promenade, préparation des soirées etc.

A 16H30 : reprise des cours jusqu'à 18H30

Soirée : soirée de distractions. Vous pouvez participer à ces soirées, en présentant des photos, films, conférence ; il vous suffit de nous prévenir sur le bulletin d'adhésion.

KIEL DISVOLVIGHAS LA STAGHO ?

La tago disvolvighas harmonie, por ke la staghanoj ne tro lacighu pro intensa studo de la lingvo.

4 kursoj : komencantoj ; plifirmigitaj, konversacia kaj supera.

La kursoj okazas matene kaj posttagmeze. Dum la posttagmangho, vi rajtas elekti chu siesti, chu alternativa agado (promeni, viziti la urbon, desegni se eblas , ktp), chu pasigi la tempon laŭ via deziro, chu prepari la vesperojn (oni atendas vian helpon).

FRAIS DE SEJOUR – RESTADO-ELSPEZOJ

A- Adhésion 35 E jusqu'au 30/04/06 *Ghis LA 30/04/06*
Aligho 70 E après la date ci-dessus *post la dato chi supre*

B – Pension complète pour la semaine

Tuta semajna kosto :

208 E par personne en chambre à 2 lits *en du lita chambro*
343 E par personne en chambre individuelle *en individua chambro*

Total 35 + 280 = 315 E avant le 27/04/05 *antau tiu dato*
Sumo 70 + 280 = 350 E après cette date *post tiu dato*

En individuelle 35 + 343 = 378 E avant le 27/04/05 *antau tiu dato*
Individue 70 + 343 = 413 E après cette date *post tiu dato*

Acompte : 80 E inclus l'adhésion p.p. avant le 30/04
Entenas la alighon p.p. antau la 30a/04

100 E inclus l'adhésion p.p. après le 30.04
Entenas la alighon p.p. post la 30a/04
Possibilité de camper à proximité - *Ebleco tendumi tute proksime*



Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon
CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO
 Stage du 7 au 14 juin 2006
BULLETIN D'INSCRIPTION - ALIÛILO

Prénom – *persona nomo* :
 Nom – *via nomo* :
 Adresse – *adreso* :

 Code Postal – *poŝtkodo* Ville – *urbo*
 Courriel – *retadreso* :
 Téléphone – *telefonnumero* :

Je participerai et arriverai : *Mi partoprenos kaj alvenos*
 (mettre une croix dans la case choisie – *Krucumi en la kvadrato*)

1° - directement à Agde à Batipaume par mes propres moyens :
Rekte en Agde ghis Batipaume

2° par le train en gare d'Agde le juin 2006 à H
Vagonare en la stacidomo de Agde la / / 2006
je la H....

Un chauffeur m'attendra en gare- *ŝoforo atendas min ĉe la stacidomo*

3° Seul(e) - sola - J'accepte de partager ma chambre
Mi akceptas iun en mia ĉambro
 En compagnie de.....
Kun.....

Séjour : chambre à 2 lits pour 2 personnes ou individuelle avec supplément de prix

Dulitĉambroj por 2 personoj aŭ individua kun prezsuplemento

Acompte : chèque à libeller au nom du : **Cercle Biterrois d'Espéranto**
Ĉeko formulita je la nomo de :

Avec cette adhésion, vous trouverez un chèque de€
Kun tiu aliĝilo, vi trovos ĉekon de€

Toutes informations complémentaires vous seront données à la réception de votre adhésion.

Aliĝante, vi ricevus pliajn informojn.

Je désire suivre le cours : *Mi deziras partopreni en la kurso :*

DEBUTANT - J'ai fait très peu d'Eo, j'ai débuté avec la méthode

.....
Komencantoj – Mi faris iom da Eo, mi komencis per la metodo

PROGRESSIF – j'ai suivi le cours de 1e année – 2ème année

Avec la méthode.....

Progresanto - mi jam partoprenis en la 2a kurso per la metodo(j)

Conversation – Je désire suivre le cours de conversation

.....

Konversacia – mi deziras partopreni en tiu kurso

Supérieur – j'ai suivi le cours de 2ème degré et suivrai ce cours

.....

Supera – mi jam partoprenis en la 2a grada kurso kaj partoprenos en tiuĉi.

Désirez-vous passer un examen ? OUI

NON

Ĉu vi deziras trapasi ekzamenon ? JES

NE

Faites une croix dans si nécessaire – *Faru krucon en kiam necesas.*

Envoyer à/ sendu al : Christian HERBETTE-RIZO 22 ZA LE BOUSQUET
 04 67 21 86 61 chrizo @worldonline.fr 34310 MONTADY

Federacia Kongreso en Batipaume / Agde, dimanĉon la 11an de junio, de 10h ĝis 17h, kadre de la staĝo/ semajno de Esperanto .

Laŭ la invito de la grupo de Béziers, ni kunvenos en tiu agrabla loko . Se vi ne konas la lokon, jen bona okazo ĝin malkovri kaj samtempe malkovri la etoson de la staĝo . Vi ankaŭ havos la okazon renkonti esperantistojn de aliaj regionoj .

Atentu, ke ni devas ne nur rezervi salonon sed ankaŭ antaŭpagi la manĝojn . Do, bonvolu informi nian kasistinon (adreso sur la dua paĝo) pri via partopreno kaj mendo de la tagmanĝo . Kompreneble, se vi aliĝis/os al la staĝo, vi ne bezonas averti nin . La manĝoj estas jam menditaj . Ni nur devas scii antaŭ la 1a de majo kaj, se eble, pli frue, kiom da kromaj tagmanĝoj estas mendendaj . Vi povas ankaŭ mendi la vespermanĝon kaj ĝui la vesperon kun la staĝanoj . Eventuale vi eĉ povas tranokti tie . **Nura kondiĉo : sin anonci frue !**

Tarifoj de la manĝoj : tagmanĝo 12^E50, vespermanĝo 11^E60, tranokto en dupersona ĉambro : 20^E . *Veillez lire attentivement ce qui précède . Nous tiendrons notre réunion dans le cadre de Batipaume où se déroulera le stage . Bonne occasion pour découvrir les lieux et des espérantistes d'autres régions . Vous pourrez même rester pour passer la soirée (animation) . Attention ! Nous devons régler à l'avance les repas à réserver . Pensez à vous annoncer auprès de notre trésorière avant le 1^o Mai, dernier délai ! Ĝis !*

91a Universala Kongreso de Esperanto



2006.07.29 - 08.05
Florenco, Italujo

Unua Bulteno



Dekstre : Simboloj de la urbo

- La mirinda kupolo de Sankta Maria de la Floro,
- La malnova mezepoka ponto kun butikoj, « ponte vecchio »
- La malnova Palaco

Florenco, kie historio fontas.

Florenco, ĉefurbo de regiono Toskanio, estas urbo kun pli ol duon-miliona loĝantaro.

Origine, "Florentia" (la floranta, la prospera) estis la nomo kiun romianoj donis al la eta fiksloĝejo fondita la 1an antaŭkristan jarcenton piede de la antikva etruska "Fiesole" [fjèzole].


Ĝi plejglorie radiis inter la 14a kaj 16a jarcento, kiam en Toskanio naskiĝis kaj evoluis tiu neripetebla granda sezono de kultura, arta kaj scienca evoluoj, nomata Renesanco.

El tiu eksterordinara epoko, Florenco gardas plej elstarajn atestojn. Grandaj civilaj kaj religiaj arkitekturaĵoj: skulptaĵoj kaj pentraĵoj arte plejvaloraj: atestaĵoj de la kreiva laboro de grandaj geniuloj: kiaj, inter aliaj, Leonardo da Vinci [leonardo da vinĉi], Michelangelo Buonarroti [mikelanĝelo buonar:oti], Filippo Brunelleschi [filip:o brunel:eski].

Kaj ĝuste ĉi tie, en Florenco, agadis gravaj pensuloj kaj sciencistoj, kiaj Machiavelli [makjavel:i] kaj Galilei [galilej']; kaj ĉi tie naskiĝis la moderna itala lingvo, danke al la granda literaturo de Dante, sed ankaŭ de Petrarca [petrarka] kaj Boccaccio [bokaĉ:io].

Florenco famas ankaŭ pro eleganto kaj bongusto. Kiu fontas el plurjarcenta sperto en kreado de metiartaĵoj, kiaj arĝentaj kaj oraj juveloj, filigranoj, mozaikoj el malmolaj ŝtonoj, ledajoj, brodaĵoj, ceramikajoj, hejrnaj dekoracioj kaj antikvaĵoj.

Unuafojan vizitanton de Toskanio nepre mirigos la natura simbiozo inter pejzaĝo kaj kulturo, inter historio kaj esprimoformoj de arkitekturo kaj urboplanado, inter la urba kaj kampara dimensioj kaj iliaj arta, arkitektura kaj monumenta havaĵoj.



Post Vilno (Litovio) en 2005 kaj antaŭ Jokohama apud Tokio (Japanio) en 2007, jen okazis partopreni Universalan Kongreson en proksima lando kaj en arta urbejo .

Aliĝi plej frue estas rekomendinde, ĉar la aliĝkotozito plialtiĝas laŭ la dato de aliĝo, kaj trovi ne tro kostan loĝejon, kutima problemo en Italio, certe eblos tuj post ricevo de la « dua » bulteno .

Atingi Florencon ne estas lacige, dank'al la reto de aŭtoŝoseoj . Veturi kaj parkumi en Florenco estas alia afero . Ne estas rektaj trajnoj el nia regiono (oni devas ŝanĝi du- aŭ trifoje)

Perbuse la kompanio « Eurolines » havas rektajn rilatojn kun Florenco, ekzemple foriro je 23h30 en Montpellier, alveno en Florenco je 9h45 matene, kun kompreneble tranokto en la buso !

Pluraj personoj demandis, ĉu oni ne povus organizi vojaĝon al la UK el nia regiono sed, male al la vojaĝo al Vilno, ĝi signifus unutage rektan veturadon . Nune estas studata la ebleco . Ĉio dependos de la proponotaj prezoj (respondo atendata). Irvojaĝo kiel por Eurolines; por la reveno, ĉu rekte sabaton post la fermo de la kongreso (alveno malfrue en Montpellier), ĉu en du etapoj por vidi iom de norda Italio . Vidu p. 10 .

Estis propono de volontula kaj senpaga stiristo (ŝoforo), komencanto en esperanto . Restus la problemo luj grandan senŝoforan buson . Ankaŭ grupo da geĵapanoj, kiuj vizitos sudan Francion poste, interesiĝas pri reveno per nia eventuala buso .

Se vi intencas partopreni la UK de Florenco kaj interesas vin la propono de komuna perbusa vojaĝo, kontaktu SFS plej baldaŭ !



DIVERSAĴOJ

MUZIKO : Vinilkosmo

La katalogo de « Vinilkosmo » daŭre plidikiĝas . Ĝi estas konsultebla rete :

<http://www.vinilkosmo.com> . Por ricevi la informojn : vinilkosmo.com/?scb=&lng=e kontaktoj kun la respondeculo F. Martorell : floreal@vinilkosmo.com

Fragmentoj de la KD estas rete aŭskulteblaj .

Laste aperis aŭ baldaŭ aperos :

“Komune” de Ralph Glomp kun lia profunda voĉo ; « Nur amiko » (vidu la lastan SFS) kun segaa muziko de la insulo Maŭricio ; « Pluke-traduke » kun artisto el Krimeo - rusia etoso kaj kelkaj modernaj muzikaloj ; « Jomo slavumas » : nia amiko en neatendita slava universo ; « Krio de morto » kun pola bando kaj eble la unua videoklipo en E° ; « Supernova » kun Brazilano kaj rokmuziko . Bunta kolekto, ĉu ne ?

INTERNACIA TV (vidu ankaŭ p.13)

ITV (Brazilo) ricevis la helpon de TVP (Telewizja Polska), grava ŝtata televidproduktanto, kiu disponigis centon da filmoj, programoj, dokumentarioj . Tiu partnereco garantias bonan kvaliton de la programoj de ITV . Vidu mem kaj eventuale helpu finance !

MONDA SOCIA FORUMO

MAS atentigas pri kelkaj interesaj artikoloj pri la forumoj :

Ĉarto de la principoj mas-eo.org/article/60.html
manifesto de Portalegro : « « 56 »
bulteno de decembro « « 57 »

« ESPERANTO-LIBERTE »

langue fédérale européenne

estis fondita antaŭ nelonge de Christian Garino, kiu fondis pli frue EDE . Ĝia celo estas prepari la prezidentan baloton en 2007 . La profesoroj Albert Jacquard, genetikisto, kaj Edgar Morin, filozofo, subtenas C. Garino . Nun estas trovendaj 500 subskriboj de «grandaj elektantoj » por la kandidato C. Garino .

E°-liberté BP 87 73700 Bourg Saint Maurice

federlangue@yahoo.fr

www.esperanto-liberte.com



GEOGRAFIO

Laŭdire Francoj ne konas geografion . Kion diri pri la usonaj amaskomunikiloj ?

Dum la oktobraj eventoj en la ĉirkaŭurboj de Parizo kaj aliaj urboj, jen kiel CNN prezentis Francion . Ni bonvenigas Cannes, kiu situas nun en Langvedoko (kaj kunportis belan klimaton kaj sian faman kino-festivalon) kaj ni adiaŭas Toulouse, nun rando de Svislando kaj proksime de Strasburgo .



BUSO al la UK de Florenco

Luado de buso ebligis en la momento la jenan tarifon (nur por la ir- kaj reven-transporto) po persono : kun 30 pasaĝeroj - 170 €, kun 40 p. 130€, kun 50 p. 100€ .

Kompreneble aldoniĝas la aliĝo al la UK (dua periodo ĝis la 31a de marto) : 200 € por membroj de UEA, 250€ por ne-membro, 100€ por kunulo (membro de UEA) kaj 150 € por kunulo (ne-membro) .

Fine de februaro, la aliĝintoj ricevos la duan bultenon kun proponoj de loĝado, ekskursoj...

GLOBISH

Ĝi estas baza angla lingvo kun 1500 vortoj kaj adaptita prononcado . Ĝia « aŭtoro » nune bruas pri la kvalitoj de sia inventaĵo, ekzemple estis artikolo en « Sciences et Vie » juniors de januaro . En la venonta SFS vi trovos pli da detaloj kaj precipe la trafajn kontraŭargumentojn de Claude Piron, aŭtoro, inter aliaj, de la konata referenclibro « Le défi des langues » .

Anonceto :

Nia amiko Jean Amoureux (1, Rue de Sorède 66100 Perpignan) kolektas ĉion, kio estas kartformata kaj kartona en aŭ pri E°, ankaŭ poŝtkartojn de aŭ pri esperantistoj, fotojn kaj portretojn de esperantistoj, ktp, ktp . Ju pli malfrŝdataj dokumentoj, des pli bone . Helpu nian kolektemulon ! Anticipan dankon !

PRI LINGVOJ

Ĉina lingvo (mandarena)

Ĝia instruado progresas fulmrapide . Ekzemple en Britio ĝi jam preterpasas la instruadon de kutimaj lingvoj (laŭ la nombro da kandidatoj je ekzamenoj). Ankoraŭ rezistas tie la franca lingvo, ĝis kiam? Laŭdire gejunuloj ŝatas skribi lingvon alimaniere . Ĉu ni skribu kaj instruu esperanton per kaligrafiaĵoj? En Francio la nombro da gelernantoj en kolegioj kaj liceoj kreskis je 35% (12 628 anstataŭ 9328). En Perpignan, oni plendas en la gazetaro, ke alvenis en la fakultato pluraj centoj da ĉinaj gestudentoj, kiuj apenaŭ parolas la francan. La lasta modo en Usono esta dungi ĉinan infanvartistinon ; oni tiel esperas esti pretaj por la ekonomia evoluo, favora al Azio, dank'al gejunuloj edukitaj en ambaŭ lingvoj .

Sur la reto : statistikoj pri la procentoj de paĝoj laŭ la lingvoj, respektive en marto 2003, en marto 2004 kaj en oktobro 2005 :

angla lingvo :	49	47	45
germana :	6,8	7,2	6,9
hispana :	5,3	4,7	4,6
franca :	4,3	4,8	4,9

RAPORTO GRIN (daŭrigo)

La du deputitoj de la departemento Lozère, P . Morel à l'Huissier kaj F . Saint-Léger, estis informitaj pri la raporto dank'al letero de Jean Hénin kaj Francis Bernard . La unua deputito faris skriban demandon al la Ministro pri Edukado (vidu ĉi-poste) kaj la dua transsendis la ricevitaĵajn dokumentojn (t.e. dosiereton) al la Ministro . Nun, ni atendu reagon de la Ministerio, eĉ se ni timas la gurditajn argumentojn...**Sur la sekvanta paĝo, vi trovos unupaĝan informilon pri la raporto . Uzu ĝin laŭplaĉe por informi !**

Bruselo : ĉe EU

La komisiono pri multlingveco, kiun prezidas de unu jaro Jan Figel (Slovakio), eldonis fine de novembro dokumenton pri la planita strategio, kie legeblas la aserto, ke « artefaritaj lingvoj laŭdifine ne havas kulturon » . Eleganta maniero elimini esperanton de la trovenda solvo en unio kun 21 oficialaj lingvoj . La prezidanto de UEA, Renato Corsetti, petis renkontiĝon kun komisionano Figel por esprimi sian indignon kaj rakonti al li pri la kulturo kaj valoroj de esperanto, « kiel toleremo kaj respekto de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj, ankaŭ de tiuj malgrandaj kaj malfortaj, kune kun sincera scivolemo por malsamaj kulturoj » . Sro Figel pli frue renkontis S-inon Handzlik, esperantistan EU-deputiton, kiu montris al li la avantaĝojn de esperanto...

Plurlingveco : Assises européennes en Parizo fine de novembro . Ĉiuj kontribuoj anon-citaj de esperantistoj estis rifuzitaj ! Tamen aŭdiĝis plurfoje mencioj pri esperanto kaj estis akceptita la propono de S.O'Riain, irlanda diplomato kaj prezidanto de EEU, fari eksperimentojn pri la propedeŭtika valoro de esperanto.

12ème législature

Question N° : 82832	de M. Morel-A-L'Huissier Pierre (Union pour un Mouvement Populaire - Lozère)	QE
Ministère interrogé :	éducation nationale	
Ministère attributaire :	éducation nationale	
	Question publiée au JO le : 10/01/2006 page : 150	
Rubrique :	enseignement	
Tête d'analyse :	programmes	
Analyse :	plurilinguisme. esperanto	
Texte de la QUESTION :	M. Pierre Morel-A-L'Huissier attire l'attention de M. le ministre de l'éducation nationale, de l'enseignement supérieur et de la recherche sur l'enseignement des langues étrangères en France. Les conclusions du rapport du professeur François Grin sur « l'enseignement des langues étrangères comme politique publique », remises au Haut Conseil de l'éducation, laissent apparaître que l'hégémonie de la langue anglaise s'avère non seulement inéquitable, contribue à une érosion à terme de la diversité linguistique et culturelle, mais de plus a un coût estimé en milliards d'euros pour la traduction et l'interprétation, la rédaction de textes en anglais, l'enseignement et la production de matériel pédagogique. Un exemple est particulièrement révélateur : en 1997, anglais et français avaient la même part dans la rédaction originelle des documents du Conseil de l'Union européenne. En 2002, la part de l'anglais était quatre fois supérieure à celle du français. Deux solutions sont proposées en faveur d'une politique linguistique plus économique que le tout-anglais : le plurilinguisme ou l'adoption de la langue-pont internationale, l'esperanto. Ce dernier scénario fait figure de l'option la plus économique, l'apprentissage de l'esperanto étant plus aisé, et plus équitable en ce que chacun devra consentir un effort équivalent pour traduire et interpréter entre la langue de communication internationale et sa langue maternelle. Aussi, il lui demande quelle est la position du Gouvernement en la matière.	

Un plurilinguisme de façade

Le système linguistique de l'Union européenne s'appelle officiellement « le plurilinguisme », mais il conduit en pratique à l'hégémonie d'une seule langue : l'anglais. Le rapport de François GRIN, remis récemment au Haut Conseil de l'évaluation de l'école à la demande du Ministère de l'éducation nationale, évalue le coût financier de cette situation linguistique pour l'Union :

- « le Royaume-Uni gagne, à titre net, au minimum 10 milliards d'euros par année du fait de la dominance actuelle de l'anglais ;
- « si l'on tient compte de l'effet multiplicateur de certaines composantes de cette somme, ainsi que du rendement des fonds que les pays anglophones peuvent, du fait de la position privilégiée de leur langue, investir ailleurs, ce total est de 17 à 18 milliards d'euros par année ;
- « ce chiffre ne tient pas compte de différents effets symboliques (comme l'avantage dont jouissent les locuteurs natifs de la langue hégémonique dans toute situation de négociation ou de conflit se déroulant dans leur langue) ; cependant, ces effets symboliques ont sans doute aussi des répercussions matérielles et financières. »



Face à ce constat d'injustice linguistique, l'Union européenne doit prendre en considération les recommandations de l'UNESCO en faveur de l'espéranto ainsi que les conclusions du rapport du professeur Grin pour qui : « le scénario "espéranto" apparaît comme le plus avantageux, car il se traduirait par une économie nette, pour la France, de près de 5,4 milliards d'euros par année et, à titre net pour l'Europe entière (Royaume-Uni et Irlande compris), d'environ 25 milliards d'euros annuellement. [...] 85 % de la population de l'Europe y a un intérêt direct et évident, indépendamment des risques politiques et culturels que comporte l'hégémonie linguistique. »

Une langue équitable pour une politique équitable

Le mouvement pour la langue internationale espéranto propose trois axes permettant de garantir un véritable plurilinguisme et l'accès à la diversité culturelle pour tous les Européens :

1. La diversité culturelle ne doit pas souffrir de la barrière des langues. L'espéranto est une langue de culture, mais c'est également une langue qui donne accès à toutes les cultures. C'est uniquement par la communication à travers une langue neutre que les Européens pourront apprendre à se connaître et à partager leurs cultures.
2. Les Européens ne doivent pas être privés de la communication internationale. Le besoin d'une langue internationale auxiliaire dans une Europe comportant bientôt 23 langues officielles est évident. Les Européens ne peuvent se contenter d'une langue que seule une élite est en mesure de maîtriser. A l'image de la Hongrie, tous les citoyens de l'Union européenne devraient avoir la possibilité d'apprendre l'espéranto, une langue maîtrisable par tous, qui s'apprend en 10 fois moins de temps que l'anglais.
3. Un réel plurilinguisme est possible. La promotion de la diversité linguistique ne doit pas se limiter à l'apprentissage de deux langues étrangères dont l'anglais. La première langue étrangère apprise sert de repère dans les apprentissages ultérieurs. Dans ce rôle de langue passerelle, les qualités de l'espéranto sont reconnues. Sa rapidité d'apprentissage et sa régularité permettent d'aborder les autres langues sans appréhension et de les apprendre plus rapidement.

VIZITO AL SUNA INSULARO



En novembro, antaŭ la malvarma sezono, ni decidis ferii du semajnojn sur suna insulo kun palmarboj . Tion mi nomas « la antaŭvintra ŝarĝado de la baterio » . Ni elektis la plej grandan el la Kanariaj insuloj, Tenerife, iam famigitan en Esperantio de la eldonejo « Stafeto » de Juan Regulo Perez . De Barcelono sufiĉas trihora flugo . Retkontakto kun la tiea UEA-delegito restis senresponda . Laŭdire li estas tre okupata, sed ŝajnas al mi, ke delegito devas respondi demandojn...

Tamen mi kontaktis alian esperantiston, kiu intervenis sur iu retlisto, kaj ĉifoje mi ricevis plurajn entuziasmajn respondojn . Evidentiĝis poste, ke du el la kontaktitaj personoj estis jam renkontitaj pli frue en Malto, unu eĉ translokiĝis de Malto al Tenerife . Alia samideano invitis nin al prelego en la universitato de La Laguna por prezento de esperanto en la hispana lingvo, sed ni ne povis akcepti, ĉar tiam ni estis en alia parto de la insulo . Tamen ni renkontis la grupon de Santa Cruz . Partoprenis deko da geesperantistoj, inter ili nur du virinoj . La plimulto el ili estis junaj . Junulo rakontis, pere de bildoj sur sia komputilo, vojaĝon al Britio, Francio, Germanio dank'al « Pasporta Servo » . Mi prezentis bildojn pri vojaĝo al la UK de Vilno kaj pri nia regiono . Ni estis akompanataj por viziti la eksan ĉefurbon, La Laguna, kaj la nunan Santa Cruz . La norda parto de la insulo estas tre verda (dank' al la pluvoj alportitaj de la alizeoj), la suda parto estas pli seka kaj

turisma . Iuj Eŭropanoj venas tien por pasigi plurajn monatojn dum la malvarma sezono sur la kontinento . Monto Teide, eksvulkano, superregas la insulon je 3718 metroj . La klimato estas agrabla en tiu sezono, la temperaturoj variis inter 19 kaj 25 gradoj . Kiam ni revenis, la temperaturo de la unua nokto hejme estis nur 2 gradoj !

Ne mankis viziteblecoj . Unu el ili kondukis nin al la apuda insulo La Gomera . La reliefo estas malebena, kiel sur insulo Madeira, kiu troviĝas fakte je pluraj centoj da kilometroj kaj kie oni parolas la portugalan . Sur la hispanlingvaj Kanarioj la angla kaj la germana estas ankaŭ vaste uzataj... La Gomera estas paradizeto, en la ĝardenoj oni rikoltas oranĝojn, bananojn kaj avokadojn...

Sed eble plej interesos vin scii, ke tie, kiel en du aliaj lokoj de la mondo, oni ankoraŭ "fajfumas" lingvon kun la nomo « silbo » (kompari kun la esperanta vorto siblo) . Pli frue oni povis tiel komuniki de iu supra loko kun alia, je 2, 3 ĝis 5-kilometra distanco . Por ne perdi tiun lingvon, oni denove instruas ĝin, tamen la uzo de poŝtelefono iom ruinigis la uzon de tia lingvo . Ni povis en restoracio vidi personon, kiu komunikis tiel kun alia persono, kaj kapablis retrovi kaŝitan objekton kaj indiki distanco pri kio temas . La fajfado adaptiĝis al la kastilia lingvo, tamen ankaŭ eblas fajfi en aliaj lingvoj ; « silbo » respektas la silabojn de la vorto kaj la akcenton, modulado de la fajfado ...sufiĉas . Tamen la lernado de esperanto estas eble pli facila kaj praktika...

Du semajnojn post nia reveno, ni ĝojis akcepti junan esperantistan Kanarianon, renkontitan tie . Iom surprizis lin nia klimato !

J.H.

PROGRAMEROJ DE <internacia.tv>



E-Dosiero

Ludoviko
en Brazilo

Di / Lu / Ja / Sab



Jennia mondo

Rio antaŭ
Karnavalo

Di / Me / Ve



E-Kurso

Pasporto al la
tuta mondo

Lu / Ma / Me / Ja

Ĉioscio

Valencio
en Fajro

Lu / Ma / Ja / Di



Sur la Scenejo

La Graveco
de la Fideligo

Mardon / Sabaton




Utilaj Informoj



Internacia
Forumo
Ĉu demokratio
en Usono sub
minaco?

KRUCVORTOJ



- I) - Granda urbarb(o)...
- II) - Tute ne idolan(o).
- III) - Duonmoko / Scivol(o).
- IV) - Mita fondint(o) / Trovebla komik(o).
- V) - Temp(o) / Andan(o).
- VI) - Bov(o) / Plurnacia lud(o).
- VII) - Duonplen(a) / s : Frigia urbo / Naz(o) por kuracistoj.
- VIII) - Ekzota muzikilo / s : Karbonato.
- IX) - Balt(a) / s : Malbunteco.
- X) - s : Dinamoparto / Kvazaŭating(o).

VERTIKALE

s : sone

- 1) - Bestet(o) en ordo.
- 2) - Bizanca rompist(o).
- 3) - Prepozicio / Iam(a) / s : Progresilo.
- 4) - Iu, ĉiu... / s : Azia muzikilo
- 5) - Marmuzikil(o) / Kolor(oj)...
- 6) - Pragmatism(o).
- 7) - Mizerul(o) / Faka tumoro.
- 8) - 78, radike / Naposplitoj...
- 9) - Postulema agento.
- 10) - s : Helena vento / s : Plektaĵo...

BOPARO

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

Solvoj de la 134-a

I	L	I	B	E	R	T	I	N	E	C
II	I	D	I	O	T	I	S	M	■	E
III	B	O	R	N	E	O	L	■	H	R
IV	E	M	E	■	A	M	A	L	E	K
V	R	E	T	I	N	■	M	I	L	O
VI	A	N	O	N	■	F	I	L	I	P
VII	L	E	■	F	L	E	S	■	A	I
VIII	I	■	A	L	A	R	M	A	N	T
IX	S	O	G	U	N	O	■	E	T	E
X	M	E	L	K	I	C	E	D	E	K

Solvoj de la ludo « kiu bildo kun kiu frazo ? »

A : 4 V B : 2 I C : 1 IV D : 5 II E : 3 III

« TV Magazine » de la 8a de januaro 2006 montras en la forumo de la legantoj tiun leter(aĉ)on . La titolo humura estas de la redakcio . Jen ekzemplo de la degenero de nia lingvo, kiam pro snobismo ĉe radio- kaj televid-elsendejoj oni uzas ĵargonon imititan de la uson-angla lingvo . Poste gejunuloj faras same kaj senpripense .
Ni defendu nia(j)n lingvo(j)n !

Manque de French Touch

Le best-of de cette chanteuse, sérieusement liftée, casting oblige, passe à la Star Academy, en prime time et en live ! Sans doute Music Awards en perspective, voire un single ; future best-seller of course, nous la reverrons jouer dans un remake de film gore lors d'un prochain serial. Cool n'est-ce pas ?
J.H.L. (Strasbourg)

Sercoj :

-Kial vi havas bandaĝitan okulon ? -La najbarino vundis min per trikilo
-Ĉu hazarde ? - Ne, tra ŝlosiltruo .

-Kial vi havas bandaĝitan kapon ? Ĉu aŭtoakcidento ?
-Jes, mia edzino trovis sur la seĝo de mia aŭto fremdan ŝminkon...

Nur en la vespero antaŭ la geedziĝfesto la patrino decidis malkaŝi al sia edziniĝonta filino unu el la misteroj de la geedza vivo . Fine ŝi diris :

-Mi pensas, ke mi devas diri al vi ankoraŭ unu aferon . Verŝajne post naŭ monatoj vi fariĝos patrino...
-Post ses, panjo, post ses ! respondis la filino

La venonta bulteno aperos en aprilo . Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la fino de marto al
Jean Hénin Beauregard-Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue Tel/Faks' : 04 66 32 86 36
Jean.henin@wanadoo.fr